Ni persistas je la necedeblaj rajtoj pri niaj landoj k niaj teritorioj, pri niaj provizoj sub- kaj superteraj kaj akvaj. Ni konfirmas nian dauran respondecon k insistas pri tio, transdoni ilin al estontaj generacioj.

Ni ne permesas estiĝi forpelitaj el nia grundo. Ni indiĝenaj popoloj estas ligataj kun nia tero k nia medio per la ciklo de nia vivado. Ni indiĝenaj popoloj migras en la piedsignoj de niaj prauloj.

Rio de Janeiro, Majo 1992.

(La teksto estis disponigita de INCOMINDIOS – Internacia Komitato por la Indianoj de Ameriko – k estis proklamita per ties svisa sekcio en la urbo-domo de Zuriko je la 11a de Junio 1992 dum la inauguro de la ekspozicio "Amazonio – Indiana Kulturregiono: Tradicioj de naturligata vivado kaj ekonomiado en la tropikaj pluvaj praarbaroj").





R.Hauger
UEA-kodo: rhau-m

CH 8093 Zürich, la 15/01/1992
ETH Hönggerberg HPF F17

*Prelegpropono por IKU 1992 en Vieno.*

## "Muroj de miljaroj – ĉu ekzistas senmuraj socioj?"

Muroj falas – ni spertas ĝin – kvazau spontanee, se ŝanĝas la kondiĉoj surbaze de kiuj ili estis starigitaj; sed muroj kaj aliaj bariloj ne ekestas hazarde, ili estas de homoj cele konstruitaj limigoj.

Ekzemploj el la historio kaj el la sciencoj montras la tendencon, ne nur testi la naturajn limojn sed ankau instali artefaritajn. Ĉe limoj eskzistas principe aliaj statoj ol enmeze de la sistemoj; sed dependas de tio, ĝis kia grado tiaj bariloj konkretiĝas: ĉu nur ĝis permeablaj vandoj au ĉu ekestas rigidaj netranspaseblaj muroj.

En ĉiu kazo ekestas ambauflanke de limigoj la tendenco al "potencialdiferencoj", ĉu de politika, ĉu de ekonomia au de alia naturo; kaj ekestas la intereso de ĉiuj ekscii, kio troviĝas aliflanke.

La ordiga funkcio de bariloj dependas en decida mezuro de la transirebleco por informado; ĉar muroj baras evoluojn, ni bezonas informojn pri kauzoj kaj celoj de la bariloj, kaj necesas krei la konvenan lingvon, por ke povu komuniki la separitaj partoj de la homaro.

Literaturo:

-Brun, Ernst, Ordnungshierarchien, Füssli, Zürich, 1986
-Forwick, Friedhelm, Eigentum und Freiheit, DTV, München, 1972
-Kafka, Franz, Beim Bau der Chinesischen Mauer, Kiepenheuer, Berlin, 1948
-kelkaj ekzemploj el la natursciencoj.

La intencita prelego baziĝis sur prespreta teksto lau por la kongreslibro proponita resumo. Post neakcepto de la prelegpropono mi ŝanĝis la koncepton en diversaj punktoj k ne plu bezonis respekti la intencitan projekton.

La nuna teksto estas aktualigita, akcentas certajn "postmurajn" evoluojn k ŝanĝiĝis parte en ironian direkton: ĝi enhavas en la fina parto kritikajn rimarkojn pri diversaj aspektoj de la kompleksaj signifoj, kiuj estas ligitaj kun la vorto esperanto.

Aldona Literaturo:
von Uexküll, Jakob / Dost, Bernd, "Projekte der Hoffnung – Der alternative Nobelpreis", Raben–Verlag, München, 1990;
(la signumo – *Corporate Identity* – de "The Right Livelihood Award" troviĝis jam en la pasinta kajero de SR (1991)(2);
Schmidt, Alfred, "Geschichte und Struktur", Hanser, München, 1971;
Ziegler, Jean / da Costa, Uriel, "A demain Karl" – "Marx wir brauchen Dich", Deforges, Paris, 1991 – Piper, München, 1992;
Meadows, Dennis, "Beyond the Limits, Global Collapse or a Sustainable Future" – "Die Neuen Grenzen des Wachtums", Chelsea Green Publishing & Co., Post Mills Vermont, 1992 – Deutsche Verlagsanstalt, Stuttgart, 1992;
Gruhl, Herbert, "Himmelfahrt ins Nichts – Der geplünderte Planet vor dem Ende", Langen–Müller, München, 1992.

Mallongigoj:

| | |
|---|---|
| ekz. | ekzemple |
| k | kaj |
| ka. | kaj alia(j) |
| ktp | kaj tiel plu |
| tn. | tielnomita(j) |





"Muroj de miljaroj – ĉu ekzistas senmuraj socioj ?"

Dispozicio

A. Enkonduko
  1. La temo en la spegulo de lingvaj k historiaj pridemandoj
  2. Diversaj movadoj celas mildigon de murdevenaj sekvoj

B. Ĉefparto
  I. Movo kiel kondiĉo de ĉiu okazaĵo – *senmura stato*
    1. Nur se movo okazas estas baroj riarkeblaj
    2. Nur moviĝeblaj subjektoj k objektoj atingas limojn
    3. Nur kie movo okazas muroj havas sencon
  II. Limoj kiel ekstremejoj de eblaj moviĝoj – *limigita stato*
    1. Muroj estas rigida bariloj au malpermesoj
    2. Baroj povas esti asimptotaj, limigantaj, maltranspaseblaj
    3. Respondaĵo al muro estas fosaĵo
  III. Muroj kiel sekvoj de evoluaj procedoj – *direktanta stato*
    1. Muroj au fosaĵoj kun celo de limigo k haltigo
      a. Naturleĝoj
      b. Naturrajtoj (homaj *kaj* vivaĵaj)
      c. Leĝoj
    2. Praktikaj interkonsentoj
  IV. Konsentostrategioj
    1. *Rolo de la alfabetigo*
    2. Konsentoproduktado
    3. *Ekonomiaj limoj malnovaj k novaj*
    4. *Europo: komuna domo au ekonomia fortikaĵo*
  *Suplemento*
    *Lingvo sub la sankta signo de l'espero*

C. Perspektivoj
  Analize ekkoni la kauzojn de bariloj k
  krei lingvajn ilojn por pridiskuto k supero

La temo de la ĉi tiu-jara Universala Kongreso "Kiam falas muroj de miljaroj: komuna europa domo" devenas de la dua strofo de la himno "La Espero", en kiu la frazo tekstas

"Forte staras muroj de miljaroj inter la popoloj dividitaj,
sed dissaltos la obstinaj baroj per la Sankta Amo disbatitaj."

La prelego ne okupiĝas pri tekstkritiko, tamen necesas demandi ĉu kongresa temo baziĝas sur himna eldiro au sur konstatita observado en konekso kun konstruota "komuna europa domo" enmeze de tutteraj malfacilaĵoj. K ankau ne temas pri kritiko kontrau teksto verkita de Zamenhof sed pri metodo tekste ataki per himnoj specifaj k ofte teruraj internaciaj temprilataj maljustecoj. Plej ofte celas himnoj idealajn solvojn, atingeblaj sur idealaj vojoj, ekz. dissaltado de baroj disbatitaj per la Sankta Amo.

Preskau ĉiam kvereloj rezultatas ne el la alstrebita celo sed el la irenda vojo, kiun volas preni la pacaj batalantoj kiuj kolektiĝas sub iu sankta signo sonĝante la sonĝon de l'Homaro.

Granda estas ne nur la sumo de la sonĝoj, sed granda estas ankau la aro de la movadoj, kiuj iel volas mildigi la parte terurajn sekvojn de baroj au eĉ efektivigi iliajn forigon - nur, bedaurinde, la gravaj diskutoj pri la planado produktas ofte pli malagrablajn konsekvencojn ol la baroj mem, kiuj kelkfoje disfalas eĉ el aĝokadukeco.

## I. Movo kiel kondiĉo de ĉiu okazaĵo

Ni memoru al la dialogoj de Platono k al la fragmentoj de la pli fruaj grekaj naturfilozofoj, ke movo estas la kondiĉo de ĉiu okazaĵo; sen movo verŝajne eĉ materio k tempo ne ekzistus. Sen movo ankau ne ekzistas baroj,



minimume ili ne estus atingeblaj. Movigeblaj objektoj k moviĝeblaj subjektoj kontraue atingas limojn, ene de kiuj ili libere moviĝas. Limoj do estas ejoj de ekstremaj moviĝoj. Konsekvence tiuj limoj povas havi iun signifon au sencon.

En la kemio, lau moderna vidpunkto praktike parto de la fiziko, ekzistas analizaj k sintezaj metodoj, do analizistoj k sintezistoj, sed sintezo sen antaua analizoj praktike ne eblas. Per analizo necesas esplori kie limoj troviĝas, kiel ili ekestis, kial ili ekzistas k kiel eblas, ekzameni la neceson de iliaj instaligo. Nur poste oni povas proponi ŝanĝi limojn au instali aliajn.

Ekzistas multaj esprimoj pri diversspecaj limoj lau ties funkciado k lau la terenoj, kiuj estas de ili limigitaj; tiuj esprimoj povas koncerni fizikajn, figurajn, metaforajn sencojn. Mi nomas kelkajn sinonimojn: fazolimo, baro, barilo, bariero, ĉirkaubaraĵo, disigilo, sojlo, rando, bordo, barikado, vando, korteno, muro k.a.

La funkcio povas esti disigi, separi, apartigi, malkonektigi, disdividi, apartigi, izoli, distingi ktp k la disigitaj partoj povas esti fazoj, sistemoj, areoj, terenoj, regionoj, distriktoj, landoj, teritorioj, sed ankau specoj, etnoj, rasoj, popoloj, klasoj, eĉ kresko, scio, informoj, ideoj, ideologioj (religioj), tabuoj; k lau logiko la instaliĝo de limoj povas esti racia, senca au lau etiko saĝa, prudenta, nehumana, abomeninda.

Specife lau praktiko, limo povas esti konata au nekonata, konserva, ŝirma, necesa, evitebla, superflua, venkebla, forigebla - mi nur memoras, ke tie, kie staris pli frue la urbomuroj troviĝas hodiau ofte bulvardoj. Nia rigardo do estas promenado tra la vortprovizo. Sed ni ne forgesu: la pritaksado de limoj estas tre individua k estas demando de la interpretado, ĉar

ies ŝirmo - alies muro.

Ambauflanke de limoj regas principe diferencaj statoj, ĉu temas pri fazoj au sistemoj; eĉ la tavolo, atoma au molekula, kiu troviĝas plej proksime al la vando, havas alian staton (fizike statdenseco) ol la enfazaj matricaj statoj; (mi nur memoras, ke loĝantoj en la landlima zono havas ĝenerale aliajn rajtojn ol la enlanda loĝantaro).

Tiu limtavolo povas servi al barado (ekz. ĉe duonkonduktantoj) au al pli facila transiro (ekz. ĉe membranoj); ĉe limoj ekzistas do potencialdiferencoj, el kiuj rezultas potencialoj au tensioj. Estiĝas tiuj tro grandaj, okazas perforta kompenso (ekz. fulmo) au inteligenta utiligo (tuneligo tra la potencialbariero).

Tio ĉio okazas analoge en la praktika vivo. Pro tio, multo dependas de la translasebleco de la limoj.

Nia plej grava "individua limo" estas la hauto; ĝi servas ŝirmo eksteren k internen k permesas ĉe granda flekseblo admirindan permeablon. En la korpo ekzistas multaj tiaj membranoj, kiuj en tre specifa maniero restas fleksablaj k permeablaj, ĉar alie ekestas malsanigaj malfacilaĵoj (ekz. trosolidigo de la arterioj).

Spite al individua hauto vivaĵoj povas miksiĝi post trakuro de diversaj membransojloj, eĉ intermiksigi genomon por posta plimultiĝo. Grava, artefarita barilo, kiu povas eviti tro multnombran mondvastan pliigon, estas preservativo; tiu rolas limigilo por protekti la teron k la homaron kontrau trologanteco; necesas iu limiga deviga protekto kontrau la inhera celo de ĉiu vivaĵo, lau naturleĝo de la vivo plenumi ĉiun neokupitan spacon.

Rilate al limo gravas, ke ties senco ĝenerale dependas de la grado de la permeableco.

Alia tre interesa fizika limo estas la tempo. Ĉe la slogano "muroj de jarmiloj" aperas la termino de la tempo, kiu manifestiĝas unu de la plej nevenkeblaj muroj de la ekzistado; ĝi baregas la estintecon de la estonteco k



ekzistas en la aspekto de la estanteco, en kiu okazas nia aktiveco. Ni mem kvazau "tunelas" ĉiumomente tra tiu temposojlo. La muro de la tempo kauzas la plej gravan fizikan k filozofian intereson; la preferita, specifa lingvo por paroli pri tempo, ekde la naturfilozofoj, estas la movo, ĉar sen movo, sen procedo, tempo ne estas rimarkebla.

Informacio k scio povas, en certa maniero, transpasi la tempon k informi nin pri la pasinteco, pri la estonteco ekzistas ĝenerale malkono; nur supozoj, espero k ideoj povas atingi ĝin.

## II. Limoj kiel ekstremejoj de eblaj moviĝoj

Koncerne limojn temas pri ejoj, kie movoj atingas au trapasas limojn.

La unua fizika mureto ekestis, kiam iu komencis, en pratempoj, instali la unuan fojon ĉirkaubaritan spacon. Tiu unua privatulo apartigis certan spacon, kiun li forprenis el la komuna grundo por posedi "privatan" terenon; tiu tereno estis rabita (ensenco de la latina vorto *privare*) k servis ekde tiam kiel privataĵo. Surbaze de tia posedaĵo ekestis specialpropraĵo, sur kiu validis ne plu la komuna rajto, sed specifa escepto-rajto, kiu evoluiĝis al prefera rajto, tn. privilegio: en tiu vorto oni rekonas la sencon de la "rabita leĝo".

Sur tiu modela procedo de instaligo de "privilegio por ĉiam" baziĝas fakte la privata ekspluatado. El la granda gamo de tiutemaj traktadoj mi volas citi jenajn:

Marat, Jean Paul, *Les chaines de l'esclavage*, unue eldonita en Anglujo, 1774;

Engels, Friedrich, *Der Ursprung der Familie,des Privateigentums und des Staates*, unue eldonita en Zürich, 1884;

Nieuwenhuis, F. Domela, "*la piramido de l' tiranismo*", Suplemento de La Juna Penso, n-ro 98 B, Jun. 1974 (origine en Internacia Socia Revuo, n-ro 4, 1913).

Necesas diferencigi limojn, kiuj koncernas la individuon kiel memstara parto de la specio k de la asocio, disde limojn, kiuj koncernas la personon kiel reprezentanto de sendependa spirita aktiveco.

Tra la persono efektiviĝas la spirita vivo de la individuo kiel certa sono, kiu tra-sonas la maskon (originala signifo de la latina vorto *personare*). Ankau la persono havas limojn de personaj rajtoj k povas eksteren transpasi limojn; ekz. estas prikantita en la epopeo *Odiseo* de Homero, ke la vortoj forlasas la "barilon de la dentoj", do ke ili forlasas la personan sferon k estiĝas esprimita opinio.

Persona opinio povas esti esprimita surbaze de informo k scio k surbaze de la fizika kapableco ricevi informojn k esprimi ilin.

Ironie estu menciite, ke ekzistas tamen simpla metodo malricevi novajn informojn, tio estas speco de portebla muro en formo de la famekonata tabuleto antau la kapo; ĉar tia persona mura atingaĵo devas konsisti eĉ el tropika altvalora ligno, necesas senarbigi tropikajn praarbarojn por gajni ekz. tektonolignon.

Se iu tro forte protestas kontrau la reganta ŝtata ekonomia perforto okazas, ke la autoritatoj konstruas specifan individuan muron ĉirkau tiu persono, hodiau en formo de betonita kubo nomita malliberiga ĉelo. Pli frue okazis tio en formo de ronda turo.

Sed ekzistas ankau ebleco por libera persono propravole limigi sin, ekz. por savi la propran vivon helpe de memcenzuro pro murdminacoj; tiel devas sinteni sin



multaj ĵurnalistoj en la opresaj ŝtatoj.

Tamen, ne nur en la turo vi estas ĉirkauigita de senfina ronda muro; tia muro troviĝas ankau ekstere de la turo, tio dependas nur de la viddirekto k de la pensmaniero: se iu persono kun etenditaj brakoj k kun fiksa vido al la ŝtono ĉiam ĉirkauiras grandan betonan kolonon, li devas senti sin enmurigita; ankau tio estas aspekto de limigita vidpunkto por malsolvi problemojn.

Sed la alparolitaj "muroj de miljaroj" ne estas tiaj, ili ne troviĝas en iu kastelo au en formo de tn. malvarmiga turo ĉe atomcentralo, ili troviĝas normale ĉe la eksteraj landlimoj, for de la mezo. Ili servas al la fortigo de periferaj regionoj, kie normale okazas fruktedona kreskado en kontakto kun aliaj sistemoj (au fraktala plubordiĝo en kontakto kun maro k naturo).

## III Muroj kiel sekvoj de evoluaj procedoj

Muroj de miljaroj memkomprene havas historion. Ĉe specialistoj ekestas kono k scio pri la muroj per pridemando de ties historiaj evoluoj. Ĉiu pensas al la granda ĉina muro k al la verko de Franz Kafka pri ties konstruado. Eblas do paroli pri muroj per lingvoj de teknikistoj k sciencistoj au per lingvoj de artistoj k poetoj.

Por ordigi la ekzistantajn au supozitajn "muritajn" faktojn ekestas en konata maniero sistemigoj, kiuj apologias au pridubas la cirkonstancojn ĉe la konstruado k konservado, ĉe la transformo au eliminado.

Koncerne la konstruadon de muroj la plej konata pravigo emfazas la funkcion de ordigo kontrau la ĥaoso. En la homaj socioj de ĉiuj historiaj epokoj ekzistis bariloj. Tiuj direktiĝis ne nur kontrau la danĝeroj de la naturo k de la bestiaro, sed ankau kontrau aliaj popoloj, etnoj, rasoj, kontrau barbareco au barbaroj, kiujposedis alian kulturan

nivelon. Sed muro kiel rigida konstruelemento ne ĉiam taugas barilo kontrau ofte nedifinita ĥaoso; se la premo el la supozita malordo estiĝas tro granda, rigida muro ne povas persisti. Guste fundamentalismoj tre cele konstruas tiajn rigidajn ideologiajn murojn, kiuj povas rompiĝi sub la premo de enkarcerigitaj au de forpremitaj problemoj.

Muroj necesas, lau opinio de la "muristoj" kiel ŝirmo de la propra teritorio kontrau eksteraj danĝeroj k pro la sama kialo nesesas ties zorgema konservado. Sed se tro rigida muro malebligas la informiĝon pri la evoluo de la eksteraj danĝeroj, povas grave plialtiĝi la ambauflankaj tensioj. Pro tio la homoj jam tre frue ekkonis, ke necesis pordegoj por ebligi la varo–interŝanĝon kun la barbaroj, kiu ankau el teknika vidpunkto povis esti interesa. Tiu ebleco preskau en ĉiuj praktikaj sistemoj ekzistis, ĉu ĉe la romiaj remparoj au ĉe la fera au bambua kurteno.

La ekzistado de baroj efektivigas eĉ la inovigan serĉadon de ĉirkauirantaj eblecoj por praktika ekonomia interŝanĝo. Tio rilatas ankau al la konata homa scivolemo, antau ĉio se evidentiĝis, ke la ŝirmo aldone celas la malebligon de la informinterŝanĝo. Ĉiu supozas, ke post la muro kiel post la granda montaro au maro la mondo verŝajne ne finas. Tiuj supozoj plialtigas ambauflanke la tension de la scivolemo, kiu serĉas kompensadon.

La kaŝita grava celo de baroj en la hodiaua tempo intencas preskau ĉiam au la protektadon de privilegioj au la malebligon de informinterŝanĝo. Nevideblaj baroj povas esti eĉ pli signifaj pri tiuj kaŝitaj tendencoj ol videblaj bariloj.

Fakte la muroj au ties respondaĵo, la fosaĵo, ja ne estas la realaj limoj, sed ili faras diferencojn videblaj, kiel ankau la artoj ne reproduktas videblaĵojn, sed intencas fari ion videbla (Paul Klee). Tio estas grava diferenco.

La sama signifo havas ekz. la naturleĝoj: ili ne kauzas



la moviĝon de la materio, sed ili priskribas per modeloj ĝian movadon.

Leĝoj estas la senvideblaj apartigiloj de la socio k sekve de la ŝtato. La laute deklaritaj naturrajtoj de la homoj k aktuale ankau de ĉiuj aliaj vivaĵoj estas repostuleblaj nur per kodigitaj leĝoj; sed tiaj varias de unu teritorio al alia lau bezono k interpretado, k la leĝoj en socio kun videblaj muroj estas aliaj ol en najbara socio sen videblaj muroj. Kelkfoje necesas kaŝi la murojn malantaue la leĝoj. Manipulado de la leĝoj nur senvualigas, ke "vera" justeco per leĝoj estas ridinda fikcio.

IV. Interkonsentoj k konsentostrategioj

En ia maniero, ekzistanta ŝtato devas trovi praktikajn interkonsentojn de ĉiuj sur sia teritorio troviĝantaj partikularaj interesoj – au ĝi disfalos, ne disbatita de pacaj batalantoj sed ekz. per furiozanta etna–religia intercivitana milito.

Por eviti tion necesas la produktado de interkonsento. En pli fruaj epokoj interkonsentoj okazis per lingva interaranĝo, eble per helpo de la sankta auro de insignoj au per anatemaj minacoj, sed sen dokumentita leĝoforto (leĝoj ankau hodiau nur admonas la homojn pri eblaj malagrablaĵoj, se ili ne obeas ilin !).

Tre konata slogano por instaligo de interkonsento tekstas "juro k ordo" (*law and order*), ĉe kio la preferita ordo ne baziĝas sur juro, sed sur tn. "lauordaj" au "ordigaj fortoj", kio estas en multaj ŝtatoj la eufemisma esprimo por bandoj de uniformitaj kriminuloj k dungitaj murdistoj.

Aktuala slogano por esprimi malinterkonsenton kun la registraroj tekstas "Ni estas la popolo"; tiu manifestado povas dauri nur mallongan tempon, ĉar popolo bezonas, lau opinio de la autoritatoj, registaran klikon. Estus do pli

bone jam dekomence ĉanti "Ni *restas* la popolo (stultigata)."

Anstatau konstrui sociajn murojn estas ankau pli sukcese, plej eble baldau enkonduki la famekonatan demokratian (ne demokratan) konsentstrategion. Post disfalo de la soveta socialismo ja triumfas la merkato, k la iama malamiko nun ne plu havas strategian validon, nur merkatan valoron. Demokratio estiĝis multekosta monopola markartiklo, kies licenco kuŝas en la manoj de la kapitalo. Por demokratio kiel por ĉiu propagando-varo ekzistas du modeloj: unu luksa por hejma uzado k alia por eksportado en la periferiaj kolonioj.

Lau *Noam Chomsky* (profesoro ĉe M.I.T.) la demokratio estas esenca metodo de la konsentproduktado kun la celo, funkciigi la ŝtatan povon lau la intencoj de la plej grandaj ekonomiaj profituloj.

Aliaj konsentproduktantoj estas la religioj au ideologioj k la sciencoj. La religioj pretendas per senfina propagando posedi la "eternajn verojn", la sciencoj postulas kvazau religie, helpe de la "elektronika loĝejo-altaro" (televidilo) posedi la "sciencan veron".

Plej danĝeraj baritaj terenoj estas tiuj, en kiuj laudire regas ia fikcia vero, kiu per apodikta muro intencas izoli veron de malveron k kondamnas la nekredantojn. (Eble baldau ne plu temas pri scienca au nescienca, sed nur pri sencdona au sensenca).

Tre vastigita metodo por instaligi terenon ekster la scienca k materialisma progreso baziĝas ne sur la religia "principo espero", sed sur la spertebla "principo feliĉo" montriĝante ofte en iu speco de esotera holismo (ekz. *Scientology* ĝis *New Age*). La serĉado au manio pri feliĉo, ofte difinite lau manieroj de la infanfabeloj, ĉirkauigas personan k unuiĝan sferon per nevideblaj bariloj, ene de kiuj "okazas" feliĉo. Manioj kreas siajn muretojn k ŝirmas



la propran feliĉon kontrau eksteraj influoj. Tio ja estas ĝuste la menciita determino de muroj: defendi propran staton k repuŝi fremdan, flegi internajn ideojn k pridubi eksterajn.

Certaj partoj de nia konsumisma socio troviĝas hodiau, dank' al plej diversaj farmakaĵoj, en la stato de feliĉaj idiotoj.

Restas al ni la demando: kial estas filozofoj, se ili havas la raran ŝancon al praktiko, ne la preventuloj de katastrofoj, sed ofte ties kauzuloj, k kial estas religioj ne la preventantoj de militoj, sed plej ofte ties elvokantoj ? Ĉu rilatas tio al la pretendo, posedi la unusolan veron k konkeri ĉiun posedeblan teritorion ?

### *Rolo de la alfabetigo*

Por ekkoni la gvidan rolon de la amaskomunikiloj (medioj) helpas pli detale mencii la antaupasintajn informo-paŝojn. Post transpaso de la persona buŝa komunikado (*la parole*, "la dirado") al "la parolado" (*la langage*) okazis la fiksado de la lingvaĵo per skribado (*la langue*, "la lingvo"), k pli poste la transiro de la patrina lingvo al pluaj frataj au eble al komuna internacia lingvo.

Pli frue, la kleruloj kontrolis au eĉ malpermesis la aliron al la skribitaj "sanktaj fontoj", ĉar legado estis ebla nur por malmultaj homoj. La alfabetigo rompis fundamente tiun muron: ĝi permesis ne nur audi la vortojn de la "granda prezidanto" dum ties persona ĉeestado sed ankau legi ilin, legi la informojn pri la bazoj de la socia maljusteco, legi la deklarojn pri "necedeblaj homaj rajtoj", propagitaj en UNO k UNESKO (rajtoj papere administritaj de ruzaj ĵuristoj kiuj tre bone scias, ke la faktaj posedantoj de la povo piedpuŝas tiujn homajn rajtojn tiom longe kiom eblas).

Kion ekz. helpas tiuj deklaroj al indianoj en Amazonio (ekz. Yanomani Parakana, Paraxo, Xavante, Yuki) k al multaj aliaj indiĝenoj sur la mondo, se la kapitalisma civilizacio detruas iliajn vivmediojn k se ekspluantaj institucioj forrabas ilian grundon sub la preteksto de "evoluo"?

Tamen la alfabetigo rompas, ankau hodiau, gravan muron, ĉar ĝi ebligas la disvastigon de informado ĝis en la plej malgrandan kabanon, kie troviĝas leĝkapablulo. Sed nur ŝtataj programoj de alfabetigo faras el lingvo "danĝeran skribaĵon", kiu ebligas ne nur informadon sed ankau agadon, agadon por homaj rajtoj, agadon kontrau socia neprogresinteco k ankau klerigadon pri saneco k loĝantara direktado.

Pro tio, la unua batalo de puĉoj k militoj celas la posedon de la amaskomunikiloj, per kiuj la kontrauuloj facile povas diskonigi iliajn ofte mallongpiedajn mensogojn.

La disvastigo de socialaj informoj per "liberiga teologio" (Leonardo Boff, Gustavo Gutierrez, Jon Sobrino) k per socialigaj ŝtatoj estas la plej granda danĝero por la ekspluatanta imperialismo k ties subtenanta "real-ekzistanta" katolikismo, kiuj ekde la 12a de oktobro 1492 ĝis hodiau ne ŝanĝis la metodojn de la materia k kultura supremado sur la amerika bikontinento.

Alfabetigo estas la bazo por la enkonduko de justaj reformoj, k ĝuste pro tio estis k estas la alfabetigo la principa kialo por la ŝtatterorista milita engaĝo de la imperialismaj registaroj kontrau Kubo k Nikaraguo. Nur per religia k misinforma stultigo la privilegiitoj profitas el la netranspasebla barilo inter ekspluatantoj k ekspluatatoj. Ĉar ne ekzistas pli grava malamiko de libere fundita informado, pensado k edukado ol la klerikalismaj ŝtatreligioj au diktatorecaj pseudoreligioj, kiuj celas kvazau "dio-ŝtatojn", en kiuj ne ekzistas homaj rajtoj, sed nur tia diaĉo-rajto, pri kiu interpretas k decidas klikoj de skribaĵkleruloj, en pseudokomunismaj "popoldemokratioj" la marksismaj kameriloj au au en la okcidentaj demokratioj sin mem elektantaj kleraj koterioj.



La haladzoj de permanentaj religiaj k ideologiaj arogantecoj venenigas tagon post tagon la atmosfero de la spirita medio; ili estas la ĉefminacoj por la spirita vivmedio de la organismoj.

La porhumana laboro kontraue de ekz. Amnestio Internacia au la atakema de *Greenpeace* multe pli defendas homajn k ekologiajn rajtojn ol la fanfaronado de politikaj katastrofuloj k internaciaj institucioj, pri kies duba agnosko certaj movadoj avide klopodas.

## *Ekonomiaj limoj malnovaj k novaj*

Ne estas hazardo, ke tuj post falo de la "malvarmmilita" muro inter la ŝtatkapitalisma k la privatkapitalisma ekonomisistemoj la komuna intereso direktiĝis al la petrola energiprovizo en la arabaj teritorioj, per kio komencis la dispartiga batalo de la energiavidaj industriaj nacioj kontrau la krudmaterialriĉaj evoluaj landoj. Tiu milito signifas la evidentiĝo de novaj bariloj inter la bloko de la norda unua k dua mondo kontrau la loĝantarkreskanta tria mondo.

Funkciis ĝis nun bonege la konsumisma sistemo, helpe de kreditoj starigi k vivteni novajn bezonojn k merkatojn. Sed la mekanismo ne plu povas funkcii, se la "limoj de la kreskado" estas atingitaj k per enŝuldiĝo kauzita financa k ekologia pauperismo furiozas.

Estas ridinde celebri la forfalon de la enkarceriga ŝtatkapitalisma muro en la momento, en kiu la "realekzistanta kapitalismo" eniras en pli akran fazon,

heredante en la "novakiritaj" landoj eĉ tipajn naciŝtatajn militojn.

La metodoj, per kiuj la du kapitalismoj ĝis nun eksportis la problemojn, kiujn ili ne povis solvi en la propraj teritorioj, komencas malfunkcii. Ne plu funkcias la majstrado de la troproduktado per ekonomia kreskado, kreante novajn merkatojn per imperialisma ekspansio k per t.n. anstatauantaj militoj; varo–bezono ekzistas mondvaste, sed mankas la pagipovo! Eĉ armiloj estas nur fordonaceblaj au pageblaj per drogaĉaj miliardoj, sed tiuj miliardoj pagas la kapitalistaj landoj mem k eĉ la sumojn pro la drogaĉaj problemoj.

Post nuligo de la granda ŝajndiferenco la pli efika privatkapitalismo (baziĝanta sur klasa ekspluatado) heredas la tutaĵon de la problemoj de la malpli efika ŝtatkapitalismo (baziĝanta sur ideologia – sed ekonomie ne plenumebla ĉar ne pagebla – ekspluatado). Al la katastrofo de la propra ekologia trouzo de la vivmedioj sumiĝas nun, per alproprigo de la "novaj merkatoj", ankau ties pli grandaj ekologiaj ŝuldoj.

La propagandaj promesoj el la tempo de la malvarma milito al la "novaj evoluaj landoj" pri pli alta vivnivelo estas ne pageblaj, k landoj kun ŝuldoj da miliardoj sen pagipova merkato estas ne plu interesaj.

Post forfalo de la ordiga soveta imperialisma superpotenco renaskiĝas la etnaj, interrasaj, interreligiaj k novaj interklasaj antagonismoj k eskaladas ĝis al militoj pro novordigo de la influo–limoj.

La okcidentaj landoj liveris ĝis nun armilojn el profitemo k el la neceso subteni iliajn koruptajn satelitojn en la tria mondo; la iamaj "socialismaj" landoj liveras ilin hodiau el pura neceso por transvivado. Ambau produktas ne nur morton k detruon, sed ankau la ruinigon de la koncernaj landaj ekonomioj estigante tiel milit– kaj



malriĉfugantoj, kiuj intencas invadi la europajn landojn. Tiuj formiĝas intertempe al la Europa Ekonomia Unuiĝo, lasta ebleco al pli granda merkato de pagipovaj konsumistoj. Tiu unuiĝa koncepto intencas krei la "fortikaĵon Europa", preta al perarmila defendo de sia vivnivelo kontrau invado de azilantoj (surbaze de la konvencio de Schengen, Luksemburgo). Ankau nelonge ankorau sonis la slogano de la NATO–propagandistoj orienten: "Malfermu la Pordegon !" Sed el la pordegoj venas nun milionoj esperante la ekonomiajn atingaĵojn de la kapitalistaj propagandistoj – memkomprene senkoste kiel antaue promesitaj. Certa "paco–krizo" frapas al la pordoj de la malvarmaj k varmaj militistoj, kiuj vidas ektime kiel la "reĝo de la malbeno" transformiĝas en armeo de konsumemaj, sed senmonaj "pacaj batalantoj" por la propra ekonomia progreso senkonsiderante la "limojn de la kresko", kvankam ni jam troviĝas "*Beyond the limits*". Kiel malmultekoste estis la milita venko por la sekurigo de la arabaj oleoprovizoj, k ties kostojn eĉ pagis la japanaj k la germanaj interesatoj. Rilate al la multekosta paca venko pli taugas konata citaĵo: "Plua tia venko – kaj ni (finance) perdiĝos" (Pyrrhos, Asculum, 279 a); tia venko vere nur estas rekompensebla per la espero al senskrupula ekspluatado de la iamaj sovetaj mineralriĉaĵoj. –

Kune kun la resto de la mondo nun ankau la iamaj sovetanoj povos ĝuj la benaĵojn de la "nova mondo–ordo", kiu baziĝas sur la malnovaj, sed ĝis nun sukcesaj blankhautaj k bluokulaj mensogoj.

La tn. "disfalo de la planekonomia socialismo" favore al libera merkato tutcerte ne signifas paradigmo–ŝanĝo, ĉar ambau produktis la samajn profitkauzitajn mondvastajn problemojn, kiuj senrigida direktantaj mezuroj kauzos kolapson.

Mi konfesas malproksimiĝi de la kormova kongresa temo de falantaj miljaraj muroj. Tamen necesas mencii, ke ni ĉiam audas kun granda intereso la konstaton, ke Marx nun estas morta. Tiu novaĵo estas konata jam ekde la 14a de marto 1883, nur la marksismo kiel ilo de ekonomia analizo (ne kiel scienco!) tre vive konstatas, ke la kapitalismo samtempe kun la falo de la muro eniras en la fazon de la memdetrua agonio, k la famekonata mortinto eĉ ne povis supozi, kian ruinigon de la ekologio tiu profitavida sistemo intertempe celebras. Marx ankau ne povis reflekti pri medio-kapitalo, pri ekologio-bilanco, pri la eksterigo de la energikostoj k el tiu rezultanta plenkosto-kalkulado, ĉar tiaj demandoj liatempe ne estis aktualaj. Aktualigitaj marksismaj analizoj estas spite k eĉ pro disfalo de la ŝtatkapitalismo validaj, tion montros novaj krizoj de la kapitalista mondvasta ekonomiado.

La kapitalismo estas surbaze de sia logiko perfida sistemo, kiu baziĝas sur la malegaleco inter kapitalo k laboro k kiu promesas al ĉiu unuopulo la ŝancon, tiri profiton el la apliko de tiu ekspluatado. Memkomprene ĝi disponigas laboron ankau al proletoj, dungitoj, salajruloj por tielmaniere nutri sin, egale al la eklezioj, kiuj faras tiom multe por la malriĉuloj (dummiljaraj), nur strikte nenion kontrau la kialoj de la malriĉeco; la malriĉuloj ne estas subjektoj de siaj liberigo, ĉar sub tiu kondiĉo abrupte finas la eklesia subteno.

Parte estas reakcia fundamentalisma sinteno pli zorgema rilate al la vivmedioj, sed per la senindulga rifuzo de kontraukoncipado ekestas amasoj de novaj mizeruloj en la katolikaj evoluaj landoj - kiu sukcese plenumas la provizon de la malmultekostaj laborsklavoj. Jes, la kapitalismo ŝanĝiĝis en siaj ekscesoj, sed ne en la logiko (Leonardo Boff: ankau la lupo, kies dentoj estas mallongigitaj, restas la sama besto). El tiu kialo okazas la



kapitalismaj ekscesoj ne plu en la centroj, sed en la periferio, kie regas la tipa institucia ekspluatada teroro (ekz. la cela murdigo de ĵurnalistoj k progresemaj pastroj au la dungitaj murdigoj de kamparanoj, indianoj, sindikatanoj en la tria mondo).

Tiu profitorientita logiko restos tiom longe senlaca, kiom longe troviĝas ie surtere ankorau unu ne ekspluatita provizejo k unu iel ne plenŝtopita merkatbreĉo. Sed la benaĵoj de tiu alta vivnivelo por la adeptoj estas nur pageblaj per la kapitalteroristaj metodoj de la Mondobanko k de la Internacia Monetara Fonduso, kiuj helpe de koruptaj marionetaj reĝimoj elpremas el la popoloj la sumon por rentumo k repago de la "ŝuldoj", kiu refluas en la industrilandojn en pli granda skalo ol tiuj disponigas la t.n. "evoluan helpon". Ju pli grandaj la "suproj" ( ekz. la ekologia en Rio, la monara en Munkeno), des pli katastrofaj estas la rezultoj por la stato de nia planedo.

Kiu do ne rekonas en la mondvasta akcentualigo de la nord-suda konflikto la iamajn konfliktojn de la klasoj ! Tiuj mondvastaj kontraudiroj ne estos venkeblaj per naivaj idealismaj homaranismoj au internaj ideoj, sed nur per rezignoj pri avantaĝoj, kiuj rezultas el la ekspluatado de la klasdiferencoj.

La hodiaua plej efektiva kapitalisma metodo de kontrolo k direktado estas la detruo de la provizado per propraj rimedoj en la landoj de la Tria Mondo, antau ĉio de la nutraĵproduktado. Per prezdumpingo, agrarmanipulado au eĉ militoj la enlanda produktado estas unue ruinigita, tiam la lando dependas de eksterlandaj importoj. Tiel la reĝimoj estas per malsato manipuleblaj k devas akcepti la kontrausocialajn kondiĉojn de la internaciaj monetaraj gangsteroj, dum ke la instaligita korupta kliko sin memriĉigas k ĉe eventuala puĉo ricevas azilon en Usono au

Europo.

Per tiu metodo multaj iamaj nutraĵeksportantaj landoj ŝanĝiĝis en importdependaj. Plua kelkjara nutraĵliverado ĉiam denove malinstigas la memproduktadon k devigas la landojn, ne nur elvendi siajn krudmaterialojn, sed eĉ eksporti nutraĵojn en la riĉajn landojn por repagi la ŝuldojn pro instalitaj senutilaj prestiĝaj projektoj.

La "Komuna Europa Domo" estas necesa kapitalista farso de la translimaj multnaciaj trustoj por savi la profitojn tiom longe kiel eble antau la ekologia bankroto (tipa ekz. estas la movado de la asbestproduktinto St. Schmidheiny sub la titolo "Kurswechsel").

Kontraue al religiaj fundamentalismoj la pseudokomunisma k la kapitalisma sistemo persistas stupide sur postuloj de kvanta k materia progreso. Tiorilate estas la aĉtrista stato de la mondo eĉ rekta sekvo de la t.n. scienca progreso, kiu ruinigas hodiau nek nur la indiĝenojn, sed ankau amason da specoj de vivaĵoj, antau ol ili estas elkovritaj k esploritaj. Tio signifas, ke ne nur la ekonomio, sed ankau la tekniko k multaj sciencoj evidente ne konas etikon. Tio estas rekta riproĉo al la supertaksado de diversaj sciencaj progresoj, kiuj servas grandparte kiel armiloj de teknika superregado. La "grandsekto scienco" estas la plej maltolerema hodiaua instrumento de la eraro de morgau.

Unue necesas hodiau priservi la riĉecon de la ekzistanto sen trotaksado de unuopaj elstaraĵoj k majstroj k sen celebrado de movada folkloro.

*Suplemento: Lingvo sub la sankta signo de l'espero*

SR eble ne estas la ĝusta forumo al diskutado de temoj



rilate al movadaj malfacilaĵoj, sed en la momento, en kiu neniu povas scii, ĉu ISAE kiel parto de tiu movado povas travivi, necesas iu forumo aperta, por ke minimume ekzistas ŝanco priparoli problemojn, kiuj rilatas ankau al Esperanto entute.

Pro tio, la diskuto direktiĝas al ĵurnalistoj, al filozofoj, al iamaj komunistoj, al TEC-ano, al autoroj de pli fruaj, ne plu aperantaj ĵurnaloj kiel Sciencaj Komunikaĵoj kaj Scienca Mondo k memkomprene al soci- k natursciencistoj. Tia libera diskuto verŝajne ne eblus en alia E-publikaĵo pro mankanta sendependeco. La redakcio intencis tian diskutan forumon en la ISAE-nova-B, sed pro mankanta financo tiu verŝajne ne plu povos aperi ĉiam samtempe kun SR. Ĝuste pro tio mi proponas la diskutan aldonadon sur la lastaj paĝoj de SR, k aldone al la antaua traktaĵo pri la kongresa temo mi riskas komenci sufiĉe provokan diskuton.

Cetere ni scias, ke E ekvivis k vivas, kvankam ne komforte, el la ekzistado de lingvaj baroj k estas pro tio elemento de certa lingva folkloro prezentiĝante ankau folklore.

Ĉiuj esperantistoj k ni kiel membroj k autoroj de ISAE estas aplikantoj de la lingvo esperanto, ni ne estas unuarange profitantoj. Se E venkus verŝajne tute aliaj personoj ol la hodiauaj uzantoj estus la profitantoj, instaliĝus tre diversaj interesatoj k tirus profiton el mondvaste disvastigita helplingvo. La hodiaua esperantistaro kun sia etburĝa strukturo k internaj diferencoj ne estus adaptitaj al la bezonaĵoj de mondvasta disvastigado. Supozeble la kvereloj de diversaj graviguloj kauzus interesrilatan kaoson inter la ambiciaj profesiaj k malprofesiaj lobiistoj de tiu mondlingvo. Ni rigardu ekz. en la disfalinta GDR la hodiauan nulan rolon de la instigintaj idealistoj. Ankau la esperantistaro ofte reprezentiĝas

kvazau eklezia unuiĝo de kredantoj, en kiu ĉiu kredas esti la pli ver(d)a kredulo.

Sed tiu ĉi traktato feliĉe ne devas pritrakti la eventon de la fina venko sed pli bazajn praktikajn dispozitivojn. La kondiĉoj de la hodiaua ekonomia kadro, minimume en ISAE, postulas ke ni racie disponigu pri la malmultaj fortoj k ĝuste tiaj estas la problemoj de la nova ISAE-estraro; ĝi estas preta kunlabori kun tiuj progresemuloj, kiuj komprenas progreson kiel plialtigon au minimume stabiligon de la vivkvalito, sed ne kun aliaj, kiuj komprenas progreson nur kiel kvantan lau ekonomio, kapitalo au kosto. Tamen, nia okupo pri tiu bona intenco ne povas sufiĉi el tute praktikaj vidpunktoj, ĉar ISAE ne povas vivi per tio, ke ĝi produktas ion, kiu estas farita en la lingvo esperanto, se la produkto ne estas tia, ke iu pretas aĉeti ĝin pro jenaj diversaj kauzoj:

1. pure lingva intereso,
2. aktiva intereso pri enhava informo,
3. pasiva intereso pro asocia membreco,
4. intereso kiel kredanto au kredulo de la E-ideologio.

Efektive ekzistas problemo ĉe la uzo de la vorto E, kiu povas signifi:

1. la pura internacia (help)lingvo esperanto,
   de AIS nomita "ilo", intereso ligita ofte kun lingvistika priokupo;
2. la fakto uzi tiun lingvon kiel informilon,
   farado de multaj esperantistoj, intereso ligita ofte kun esperantologia priokupo;
3. la movademo, kiu propagandas la aplikon,
   ekz. por ĝenerala faka agado (kiel la agado de ISAE lau statuto), plue la apliko, kiun celas UEA k konkurencaj asocioj, intereso ligita ofte kun la intenco de eksterfaka prestiĝo;



4. la interna ideo ĉe la apliko de la lingvo,
   en la formo ekz. de hilelismo, Esperantismo, homaranismo, ideologie mondkoncepta komuneco;
5. la gramatika subjekto, kiu estas en la stato de espero
   estiĝi agnoskota kiel internacia lingvo.

Fakte "Esperanto" signifas komplekso de nocioj, dum ke esperanto estas "nur" lingvo; funkcioj 1 - 4 estas signifikatoj, 5 estas signifikanto.

Memkompreñe eblas miksaĵo de la diversaj priokupoj, k pro malprecizaj difinoj restas multaj diskuteblecoj. Tamen estas ofte duba, lau kiuj kriterioj ĉiu unuopulo decidas en tutsimplaj ĉiutagaj decidoj.

tiu demando tuŝas la sintenon, ĉu lingvo estas pli ol nur informa mediilo, kiu atingas kiel akustika sono limojn, au ĉu ĝi kapablas trapasi limojn ne nur kiel cerbo-kreaĵo, sed en rekta korpa interŝanĝo. Tiu demando koncernas ankau la novan internacian analfabetismon, kiu moviĝas kvazau malantauen al signoj, piktogramoj, novaj artoj k korpo-lingvo ĝis al artefaritaj feromonoj.

Kiel interesato, koncernato k trafato mi mem interesiĝus ekz. pri motivoj de niaj membroj k eĉ de ĉiuj esperantistoj, ĉar kiel ĝen. sekr. mi memkomprene intencas, vivteni ISAE k SR por ĉiuj celoj k eble ankau por eventuala pli posta rolo, ĉar la aktuala stato ne povas esti la fina celo.

Ĝenerale ni devas serĉi la kunlaboron kun ĉiuj, kiuj havas ekscitteorian intereson, antau ĉio kun laborantaj sciencistoj same kiel sciencinteresantaj laboristoj, kun filozofoj k parasciencistoj.

La pura esperantismo tamen al mi ŝajnas plie ideologio, kiu helpe de elcerba kreitaĵo nur konstruas novan muron. (Ideologioj cetere ofte estas karakterizataj per la fakto, ke en ties rondoj mankas la pli praktikaj virinoj!)

Interna ideo, iama hilelismo au nuntempa homaranismo estas iu sinkretismo, mikspota kreaĵo el diversaj pli au malpli bonvolaj pli fruaj ideologioj k religioj, en ĉiam ŝanĝantaj relacioj. Tamen ni ŝuldas al ĉiuj humanismoj k al kuraĝaj porhumanaj k ekologiaj movadoj la mencion, ke ili kuraĝe batalas kontrau personaj kultoj k terorismaj diktatorecoj de regintaj k regantaj politikaj banditoj.

Necesas do emfazi, ke E povas esti danĝera lingvo, sed certe ne estas danĝera movado! E estas eble kontraunacionalisma, sed tamen autoritatema movado kun etburĝa karaktero, kun certa tendenco al mondcivitaneco sed sen iu politika signifo au nur tendenco, nur kun la instigo al ŝanĝo de lingvaj hegemonioj. Tio memkomprene ne estas riproĉo, tamen estas klara konstato. E pretas pro tio aranĝi kun tre diversaj ekonomiaj k politikaj sistemoj se nur la helplingva intenco estas tolerata. Aliaj ambicioj ekzistas nur en specifaj suborganizoj. Pro tio E ĝenerale ja ankau ne batalas (eĉ ne pace!) por la programa celo, sed estas tre dankema pri ĉiu ŝtata au interŝtata rekono, se nur efektiviĝus !

Tiel ĝi jam travivis centkvinjaran periodon de bedaurinda frustrado en esperanta sindediĉo. Ni bedaurinde ĉiuj suferas sub tiu kondiĉo kun pli malpli humoro pri la ne pli efektiva funkciado. Sed kiuj estas la kauzoj? Ĉefkauzoj estas certe ne la du mondmilitoj, kiujn oni ofte citas, ĉar intertempe ni havis en Mez-Europa 45-jaran pacan periodon.

La kauzoj do devas ekzisti plie en la movado mem, ĉar estas strange, ke tia tre praktika ideo de internacia helplingvo ne povas gajni pli sukcesan signifon. La burĝa socio, en kiu E grandparte estas disvastigata, ne kapablas au ne ŝajnas interesiĝi pri pli granda internacieco.



Kontraue, oni spertas, ke la mencio de la nomo E renkontas ne difinitan, sed tamen kontrauan sintenon, k denove necesas demandi sin, kial tia inteligenta ideo ne provokas spontanean subtenon tute kontraue al multaj banalaj novaĵoj, kiuj ĉiutage triumfas sur la kampoj de la tekniko (armiloj), nutrado, saneco, ekologio au ekz. la modo: ĉiujare funkcias denove la metodo, submeti milionojn al libervola diktatureto celante forĵeti tion, kiun ili pasintjare plaĉe aĉetis. Multaj ankau submetas sin al grandaj streĉoj por studi novajn komputorajn metodojn au lerni naciajn lingvojn; tia stranga manio ne ekzistas rilate al E, ŝajnas ke tute ne ekzistas mania sindediĉo al "sankta harmonio", sed plie manio al sonĝo pri.

Tute kontraue: diskutinte pri la nova europa mon-unuo bavara ministro Gauweiler havis la impertinentecon, por demontri la specifan netaugecon de la ecu-o, nomi ĝin "Esperantomoneron"; estas ja ankau fakto, ke ne eblas gajni direktantaj politikistoj au funkciantaj ekonomikistoj, kiuj kuraĝas identiĝi kun E publike k autoritate. Normale ja aperas nur surpapere certaj altaj protektantoj pro cela flegado de kosmopolita ŝajno (unu de la plej bedaurindaj ekzemploj okazis kongrese en la ĉefurbo de E). Relative facile estas hodiau trovi tn. "sponsorojn" por tre diversaj aranĝoj, ekz. nacionalistaj; sed serĉu sponsoron por E-afero: post direkta mencio vi verŝajne nenion plu audos.

La kauzo certe ne estas la "danĝereco" de la lingvo; ke E povas esti danĝera lingvo ne estas dubinda, sed ĝi estas verŝajne sendanĝerigita per la sociologia medio k per la etburĝa idealismo de la uzantaj; ene de E fakte ne ekzistas alia avangardo ol lingva, k tio ne sufiĉas al internaciismo; esperantlingva informo restas enasocia informo, pri kiu ekstere de E neniu interesiĝas.

Pri eventualaj, eĉ gravaj eblaj eknovaĵoj ĉe au per la apliko de la esperanto-lingvo mankas ĉiu multiplikiga publika efiko; ŝajnas ke eblaj modelaj novaj ideoj ne povas superi la partikularisman diversecon de la movado k pro tio ne povas evoluiĝi publike; jam tiaj komencoj malsukcesas pro la sekteco de la movadetoj k pro manko de ĉiu forto al efektivigo.

Se mankas certa krita grandeco lau kvanto k lau kvalito nova ideo ne sukcesas movi ion, sed vaniĝas. Ekzistas ja la konata klasika demando: kiom da identaj eroj faras aron au: je kiu tempo aro de atendantaj unuopaj homoj formiĝas al vico. Ŝajnas ke la kunuloj de la internacia helplingvo esperanto nek kolektiĝas al rimarkindan aron nek formiĝas al vico kvanta k kvalita de interesatoj. El tiu vidpunkto E estas elita afero k klubo, eĉ eklezio kun majstro k adeptoj k kun himno, kiu estas bedaurinda produkto de historiisma siatempeco. Certa patoso de bonvolaj oldaj sinjoroj estas en la hodiaua konsumkonkurenca socio evidente nur malbone perebla, krom tio ke la anoj de la nemovebla movado troaĝas. Ni rajtas diri, ke esperantistoj estas tiurilate simpatiaj nerealistoj, kelkfoje prestiĝemaj graviguloj au anoj de akademioj, pri kiuj neniu en la mondo ol samideanoj interesiĝas.

Ekzistas eĉ ne unu profesie farita gazeto au ĵurnalo, nur tajpitaj au presitaj aglomeraĵoj de bagatelaĵoj, kiuj povas travivi surbaze de la membrokotizoj, sed kiuj ne povas ekzisti pro serĉata au kreskanta signifo. Mankas longdaura regule aperanta sciencnivela ĵurnalo kun internacia agnosko, mankas eĉ E-ĵurnalismo; anstatau tio ekzistas granda nombro de konkurencaj, kelkfoje fuŝaj publikaĵoj (cetere inkluzive de SR!).

Kvankam E vivas nur en niĉo fondiĝas ĉiam novaj



klubaj movadetoj (eĉ se kelkaj superfluaj malaperas), sed la konstanta substanco per tio ja ne plimultiĝas, sed nur etendiĝas estiĝante pli supraĵa. Tiu malagrabla sentumo ankau rilatas al ISAE, kvankam tiu ŝajnas nun pli stabila ol antau kelkaj jaroj, sed preskau estas ridinde ke por tio necesis tiom da laboro flanke de la kasisto, ĉar ekzistneceso devus esti memkompreneblaĵo. Sed ĉu ISAE vere necesas ? Restas do la klasika demando: "kion fari", do la demando pri legitima programo. Mi ankau ne scias kiel kion ŝanĝi, sed se la membroj ne interesiĝas pri au ne estas pretaj al ŝanĝoj, la plulaboro ne pli havas sencon.

Ne rajtas esti io "bona" nur pro tio ke estas skribita en esperanto au farita nome de E. Tiu memtroestimo en E devas malaperi, ni ankau zorgu ke ĝi en ISAE malaperas. Necesas forumo kun celoj, ne kun babilaĵoj, necesas sciencistoj, teknikistoj, ekonomiistoj, ĵurnalistoj, kiuj havu pretecon k kapablecon per membriĝo influi la evoluon en ISAE, kiuj pretas senmaskigi la internacian blufon en scienco k politiko anstatau kunmiksi, kiuj ne estas autoritatkredemuloj, sed kritikaj mempensantoj. Necesas kontribuoj pri klarigo de sciencaŭzitaj danĝeroj k sociaj minacoj, priskriboj de la ekonomiaj k ekologiaj organizitaj krimoj kontrau la homaro, de internaciaj politikaj analizoj, ekzistas vasta tereno kun realaj agadnecesoj k strukturproblemoj. Pro tio la lingvo bezonas la forton travivi per praktikaj vidpunktoj k proponoj k ne lau internaj ideoj. Nur ŝajnas ke mankas la autoroj kiuj publikigas pro publikaj necesoj, ĝuste pro tio E dormetas en niĉo, k en niĉeto de tiu niĉo dormetas ISAE, kvazau biotopeto en biotopo.

Urĝe bezonas ne programoj, sed la priskribo de la reala, efektive fakta stato sen strabo al harmoni-bezono, ĉar la breĉo inter pretendo k realeco pligrandiĝas. Necesas trovi realan fundon k forlasi la memtrompan idealismon de

la famekonataj "elstaruloj". Por efektivigi resonancon kun la eksteraĵo necesas unue pli bona resonanco en la sistemo mem !

Ni devas esti pretaj ankau al publikigado de ĉiu alia opinio, se ĝi povas kontribui al pluekzistado de sciencrilata praktika agado de ISAE, ekzempla ideo estas tiu pri fakaj studlibroj, sed, bonvolu, surbaze de realigeblaj kondiĉoj.

Nepra neceso estas trovi rilatojn kun eksterasociaj unuiĝoj, por ke ili povas ekscii la gravan avantaĝon de internacia lingvo, per kies helpo ili profite pretas kunlabori k interrilati. Se tio ne okazos en la venontaj jaroj de grandaj komunaj merkatoj ankau niaj klopodoj sensignifiĝos. Ĉar ĝuste kiel tre malforta parto de la tn. demokrata socio E estas pli aflikta per ties krizoj, kiel la malpli granda membraro en la iamaj socialismaj landoj demontras, konsekvenco de novaj ekonomiaj bariloj.

Slogano pri falantaj muroj de miljaroj malinteresas k estas ridinda himna frazaĵo, kiel ili ekzistas en preskau ĉiuj naciaj himnoj. Jes, kelkaj muroj falas, sed aliaj ekestas, ekz. en la kapoj de la homoj, kiel la grandaj murodisfaloj demontras per arkaikaj militoj. Nia problemo do ŝajnas esti muro, kiu ĉirkauas E, ĉu memkauzita au farita de aliaj; tiu muro eble estas ideologia au minimume idealisma, malhelpas ekkoni la realajn obstaklojn, el kiuj aliaj interesoj profitas.

Necesas ĉiam denove elmontri, en kies intereso la pure lingva bazo estas aplikita, eĉ ekspluatita, k kritiki kontraudirajn historiajn k ekonomiajn fundojn. Se esperantistoj k antau ĉio la ISAE-membroj intencas konduki tiun marĝenan publike sensignifan k bagatelan esperantlingvan "sciencan" sekton el sia niĉo k memkauzita interna geto, tiam tio devas okazi tre baldau, por ne diri nuntempe au neniam plu.



Ekzistas en la aktuala tempo, kvankam aperta al alternativoj, nur malgrandaj ŝancoj k limigitaj eblecoj, eĉ por funkcieblej internaciaj kompreniloj.

*Perspektivoj*

Por ŝajnigi minimume al la fino promesitan sanktan harmonion "oni" proponas jenajn du idealajn sintenojn:

malkonstrui murojn por plenŝuti fosaĵojn k priobservi la fakton,ke

> la libereco de la unuopulo finiĝas tie, kie komencas
> la libereco de la aliulo.